

esperanto USA

The ELNA Newsletter: News of the language problem and Esperanto as a possible solution ☆ 1/1998

Look inside for:

Mesaĝo de la Sekretario	2
Mesaĝo de la Prezidanto	3
Mesaĝo el la e-mondo	3
Alilandaj COj	4
Koresponddeziroj	5
More passport stuff	6
Recenzoj	
<i>(Vivoj ... originalaj)</i>	7
Alvoko	8
Regiono kaj loko	8
Menciinde	8
Komisiitoj & komitatestroj	8
English in the world	10
Esperanto in the media	10
A Call from the Director	11

AMERICA IS MORE THAN THE U.S.

The UEA *Komisiono por Amerika Agado*, headed by Atilio Orellana Rojas, voted at its UK meeting in Adelaide to launch two core projects aimed at strengthening the Latin-American commitment to Esperanto. The commission plans:

1. To send one person each year to the summer course at San Francisco State University. Stipends to pay course fees and lodging are available through ELNA foundations, but money must be raised for airfare, books, and other miscellaneous expenses.

2. To send one youth to each UK, expecting her or him to also spend at least two months as a volunteer at the UEA CO in Rotterdam and perhaps also participate in other European "aranĝoj" while there. Candidates must have already mastered Esperanto and demonstrated aptness for work in the "movado".

The overall goal, of course, is to send these individuals back home better equipped to inspire, teach, and lead their fellow Esperantists to a greater level of involvement.

To finance these projects, the com-

mission is asking for earmarked donations to UEA's *Fondajo Ameriko*. This is an excellent way for us North American Esperantists to concretely support the spread of Esperanto in America. You may send a check to ELNA with a clear notation that it is to help fund one of the specific projects mentioned above, and ELNA will forward the money to UEA.

The 1998 SFSU candidate, Eddy Silva Molina, is from Nicaragua, where Esperanto is serving as an invaluable means to connect up with a wider and saner world beyond the everyday uncertainties at home. In one year Eddy's work increased the number of Esperantists in that country from three to 24, in two cities, and he already plans to do more. He is a most deserving "samideano", but lives in great poverty and literally has no money to contribute to the trip. So let's be especially generous with our contributions and get Eddy to San Francisco next summer!

Small donations are as welcome as larger ones. Dankon!

Bill MAXEY (Powhatan VA)

◇ LA ĜUSTAJ DATOJ POR LA NORD-OKCIDENTA ESPERANTO-RENKONTIĜO OKAZONTA EN OLYMPIA WA ESTAS 29-31 MAJO 1998. POR PLIAJ INFORMOJ KONTAKTU: ELLEN M EDDY, PO Box 4055, TUMWATER WA 98501; ☎ 360/754-4563.
◇ LA Ĝ-JARA KONGRESO DE ELNA (24-27 JULIO) OKAZOS EN MONTRÉAL, KANADO SAMTEMPE KUN LA KONGRESOJ DE KANADA ESPERANTO-ASOCIO, JUNULARO ESPERANTISTA KANADA, KEBEKIA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO KAJ USONA ESPERANTO-JUNULARO. LA UNUA BULTENO KAJ ALIĜILO SENDIĜOS BALDAŭ.
◇ LA 4A TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS INTER LA 27A DE JAN KAJ LA 3A DE FEB 1999 EN BOGOTÁ, KOLOMBIO. INTERESATOJ KONTAKTU LA ORGANIZANTOJN: APARTADO POSTAL 54800, SANTAFÉ DE BOGOTÁ, KOLOMBIO.

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530,
USA/USONO
tel: 510/653-0998; fax: 510/653-1468;
e-mail: elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: David T Wolff
Vice President/Vicprezidanto: Derek S Roff
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: Anna Bennett
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Steven G Belant, Randy Dean, Mike Donohoo, Thomas Eccardt, Grant T Goodall, D Gary Grady, Dorothy B Holland, Reginald Jaderstrom, R Kent Jones

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: Miko Sloper
Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo: Ionel Onet

esperanto USA

Newsletter published by the
Esperanto League for North America
Novaĵletero publikigita de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 34, No. 1
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Ionel Onet
tel. 510/653-0996; fax: 510/653-1468;
e-mail: ionel@esperanto-usa.org

Materials for **esperanto USA** should be sent to/Materialojn por **esperanto USA** oni sendu al: **esperanto USA**, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA/USONO, or by e-mail/aŭ e-poŝte al: elna@esperanto-usa.org.

The opinions expressed in this newsletter are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its newsletter/La opinioj esprimataj en ĉi novaĵletero apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties novaĵletero.

Reprinting materials from this newsletter is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi novaĵletero, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikigita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 30.03.1998.

La sekretario sensekretas

ĈIAM ESPERANTE

Mia kutima laboro rilate al ELNA estas prepari la protokolojn de la Estraraj kunsidoj kaj de la jarkongresaj kunvenoj, ĝisdatigi la listojn kaj informojn en la "Manlibro de la Estraro kaj Komisiitoj", respondi al diversaj leteroj, voĉdoni pri ELNA-j aferoj kaj de tempo al tempo subskribi oficialajn dokumentojn. Tiam laboron mi faras en la "oficeja parto" de nia domo kiu enhavas la dosierojn, librojn, komputilaron kaj presilon kaj la aliajn necesojn sekretariajn. Ĉio bezonata restas preskaŭ ĉemane. Sed tio rapide ŝanĝiĝis meze de 1997.

Je la komenco de junio, mia edzo kaj mi translokiĝis al nia naskiĝŝtato, Vaŝingtono. Niaj kaliforniaj gemikoj ne povas kredi ke ni elektis ĉi tiun pluvplenan ŝtaton ol la sunplenan Kalifornion. Sed oni ne povas kompari la allogon de la ĉiamverda (kaj ofte pluvplena) ŝtato kiam ĝi enhavas ankaŭ la gefilojn kaj genepojn. Estas aferoj pli gravaj ol suno.

Ni kontraktis por la konstruado de domo sur terpeco kiun ni bonŝance aĉetis antaŭ 25 jaroj. Estis nur "eta" malfacilajo. Oni bezonas kloakan permesilon de la konteo antaŭ oni povas ricevi la konstruadan permesilon. Tio kutime ne estas problemo sed en nia situacio ege gravis. Ni havis la malbonŝancon dungi unu el la plej prokrastemaj desegnistoj de kloakaj sistemoj en la regiono. Ni fine devis minaci lin per leĝaj procesoj antaŭ ol li finfine preparis planon kiun la konteo povis akcepti. Pro tio ni nun alfrontas la defion konstruigi domon dum la "pluva" vintra sezono (tio kontrastas al la "pluvaj" aliaj sezonoj, ĉar la pluvo povas inkluzivi ankaŭ neĝon). Nia originala plano havi finitan novan domon je la fino

de la somero ege ŝanĝiĝis. La prognozo nun estas ke ni povos endomiĝi iam en marto. Do kiel la etaj nigra-kapaj birdoj kiuj serĉas diligente manĝerojn apud nia neĝkovorita ŝtuparo, ni sopiras printempon. Mia "vera oficejo" ankoraŭ ekzistas nur surpapere. Kaj la bezonataj aferoj kiujn mi opinias endaj por mia laboro restas plejparte en diversgrandecaj skatoloj stakitaj en luitaj konservejoj.

Intertempe, mi provas sekretarii en la saloneta parto de ruldomo 28 futojn longa. Sur tableto kuŝas la klavaro, subbrete sidas la komputilo kaj surbrete la presilo. En variajn spacetojn mi puŝis, stakis kaj pendigis la bazajn bezonaĵojn. Sur faldebla ligna seĝo, mi povas sidi kaj tajpi kaj eĉ sekvi la laboron de la konstruistoj el mia saloneta fenestro. De tempo al tempo tiuj laboristoj eĉ povas vigligi mian laboron kiam la bezonata elektro ne estas sufiĉa por ni ĉiuj kaj subite interrompiĝas. La komputilo kaj mi ne ŝatas tiajn surprizojn! Estante optimisma, mi scias ke tiaj malfacilajoj indikas la alproksimiĝon de pli granda kaj oportuna sekretariejo.

Kiam mi pensas pri la karaj gesesperantistoj kiujn mi devis adiaŭi en la golfa regiono, mi povas bone kompreni la senton esprimitan en la kanto "Mi lasis mian koron en San Francisko". Sed laŭ konata dirajo, kiam pordo fermiĝas, ĉiam malfermiĝas alia. Nia nova loĝurbo, Olympia, estas sufiĉe apud la ege aktiva, vigla, kreskanta Seatla Esperato-grupo. Multaj el tiu grupo estas longtempaj amikoj. Ili varme bonvenigis min kaj mi jam estas parto de grupeto kiu planas NOREK '98, la nord-okcidentan regionan Esperanto-kunvenon, kiu okazos en majo. Do mi lasis unu Esperanto-hejmon kaj tuj trovis alian. Esperantujo vere estas ĉie.

Ellen M EDDY
Sekretario de ELNA

Saluton ĉiuj!

You'll find the new ELNA Book Catalog in your mailbox soon, and we have a present for you. The ELNA Board voted to increase the discount for members from 5% to 10%. (If you know a board member, say "Thank you!" to him or her.) Non-members pay the full, non-discounted price, so the value of your ELNA membership has just increased. I'm very pleased to present this improved benefit to our members, and to non-members – here's another reason to join ELNA.

Planning to live forever? If not, you may want to leave something to ELNA in your will. Bill Harmon is our new Commissioner for Bequests, and can help you arrange matters properly. Please contact him with any questions at billharmon@juno.com or at his address in your Membership List.

And you'll see something new at this year's Landa Kongreso (July 25-27 in Montreal). When you receive your registration form, you'll find two new checkboxes: "I need a buddy!" and "Mi pretas esti kunulo!" The LK can be pretty intimidating for someone who isn't completely fluent yet. If you've avoided these exciting conventions because you were concerned you'd be lost, now you can sign up and have a buddy to help you. I have high expectations for this LK. Sign up as soon as you get the form!

I've been receiving local group newsletters, and many of them look surprisingly good. If you haven't joined a local group, check for one in your area and consider joining. You can find a list of local groups in the back of your Membership List.

One of the things I've noticed in the newsletters is a URL to Esperanto World Wide Web sites. But they don't mention ELNA's web site! We

have our very own site, with the complete Book Service catalog, calendar of events, and even a membership form. Surf on over to www.esperanto-usa.org and check it out, then tell people about it – Jay Fishman has been spiffing it up.

Many thanks to those newsletters and publicity efforts that do use our new telephone number, (800) ESPERANTO. And for anyone who has e-mail but not Web access, sending e-mail to info@esperanto-usa.org will generate an automatic e-mail response.

Also, the Elektronika ELNA-Bulteneto #3 went out in late December. If you didn't receive it, it's possible your e-mail address didn't work; address problems caused about 30 copies to bounce back to me. (Just what I needed!) If you would like to receive EEB in the future, send a message with just the word "subscribe" in the subject line to elnabulletin@poboxes.com. Contact our Listmaster, Misha Koshelev <mkosh@poboxes.com> if you have any problems.

You can find back issues of EEB at our web site (under "What is ELNA"), or by sending e-mail to eeb#1@esperanto-usa.org, eeb#2@esperanto-usa.org, or eeb#3@esperanto-usa.org. We send out EEBs irregularly, usually when we need to address something faster than the next Esperanto USA.

Hmm... the last two months have been busier than I thought.

Thanks!

David WOLFF
President

Malfermu la pordon!

Munkena E-Junularo iniciatas "Unuan Virtualan Esperanto-Renkontiĝon Tutretan (UVERT)" okazontan inter la 22a kaj la 29a de marto 1998, samtempe kun la AIS-sesio en Moskvo.

UVERT estos aŭtonoma, malferma, malorganizata, tolerema renkontiĝo. Ĝi kristaliĝos ĉirkaŭ (ekzistantaj kaj estontaj) individuaj agadpunktoj. La celo(j) de UVERT estas pli forte kunligi la retajn geamikojn de Esperanto, plialtigi la retan organizitecon de la E-komunumo kaj kreskigi la E-informkapablojn en la reto. La slogano de UVERT estas "Malfermu la pordon!", ĝia hejmpaĝo estas <http://www.esperanto.net/uvert/>.

Ni aparte ĝojas ke prof Helmar Frank, prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino, prof Lee Chong-Yeong, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, prof Reinhard Selten, Nobel-premiito pri ekonomiko, prof Humphrey Tonkin, ano de la Honora Patrona Komitato de Universala Esperanto-Asocio akceptis esti honoraj patronoj de UVERT.

La sukceso de UVERT dependos de la amasa partopreno de ĉiuj geamikoj de Esperanto, gekomencantoj, gelertuloj kaj precipe de la gvidantoj de la E-movado.

La memorganizado de la aranĝo devus funkcii sen superŝutado kun informoj (retmesaĝoj). Normalaj mesaĝtabuloj aŭ gastlibroj kaj jam funkciantaj informkanaloj devus sufiĉi por informi pri la diversaj agadoj. Ĉe la hejmpaĝo vi trovos jam ekzistantajn agadkampojn.

Kroma ĉefa tasko de UVERT estas kaj trovi izolitajn geamikojn de Esperanto en la reto kaj retrovi geamikojn kun nekonata aktuala retadreso (vidu <http://members.aol.com/fenrislupo/pub/adresaroj/sercxataj/>).

Por inviti al novaj agadkampoj, por interŝanĝi spertojn aŭ por partopreni en la diskutejo pri UVERT, bonvolu enskribi ilin ĉe la hejmpaĝo.

Ni firme kredas, ke ankaŭ vi povos realigi viajn ideojn en UVERT, kiu povus fariĝi ĝermo de daŭra reta agado komplementa al la *Kampanjo 2000* de UEA.


Reinhardt WIEWE (München DE)

Alilandaj Oficejoj de Esperanto

Dum oktobro kaj novembro 1997 mi vizitis Koreion kaj Japanion. La Hokkajda Esperanto-Ligo invitis min prelegi dum ĝia kongreso kaj instrui Esperanton al komencantoj dum la semajno antaŭ la kongreso. La kunordiganto de la kongreso, MIYAZAWA Naoto, sugestis ke mi vizitu alian landon azian krom Japanion. Feliĉe la Korea Esperanto-Asocio estis kongresonta dum precize la plej taŭga momento por mi: la semajnfino antaŭ mia alveno en Japanion! Do mi kaptis la ŝancon kaj aĉetis flugbileton de "Korea Air" por flugo de San Francisco al Seulo kaj Sapporo.

Min bonvenigis ĉe la Seula Flughaveno HO Song, Ĝenerala Sekretario de la Korea Esperanto-Asocio (vidu la ĉi-apudan foton). [Mi devas mallonge klarigi kelkajn terminojn: la koreoj uzas la titolon "Direktoro" por pli ol dek membroj, kiuj kune respondecas pri agoj kaj politiko de la Asocio. En ELNA tiuj postenoj nomiĝas "Estraranoj". La titolo de la ĉefa administranto de la Centra Oficejo estas "Ĝenerala Sekretario". Do HO Song kaj mi laboras en similaj postenoj, malgraŭ la malsamaj titoloj.] Ni tuj veturis al la CO de KEA, kie mi renkontis kelkajn Direktorojn kaj laboremajn junulojn kiuj pridiskutis inter si (malfeliĉe plejparte en la korea lingvo) lastminutajn detalojn pri la kongreso. Dum ili babilis per lingvo kiun mi ne komprenis, mi fiksigardis tra la fenestro. Kia vidaĵo! De la 16a etaĝo de konstruaĵo lokita apud grandega rivero, oni vidas mirindan panoramon energiplenan. Jen scintilas la rivera akvo plena je ondoj de barĝoj, jen brilas lumiloj de apudaj konstruaĵoj grandegaj, jen lamparo de busoj kaj aŭtomobiloj sur la ŝoseoj. Nekredeble bela! Mi miras ke HO Song po-

vas eviti la tenton fiksigardi tra la fenestro dum horoj. Sed, nu, ankaŭ en nia Centra Oficejo ni devas lukti kontraŭ simila tento, ĉar videblas tra niaj fenestroj San Francisco kaj la belega monto Tamalpais. Tamen mi tre alte taksas la vidaĵon el la CO de KEA. La oficejo mem estas unusola granda ĉambro kvadrata (kun lateroj de ĉ. 10 metroj), en kiu troviĝas du grandaj skribtabloj (unu por HO Song kaj unu por lia asistanto CHANG Yun-hee); tri grandaj tabloj ĉirkaŭ kiuj laboras volontuloj sidante sur kelkdek seĝoj; dekoj da dosieroskrankoj en kiuj supozeble kaŝiĝas la oficialaj paperoj da la Asocio; dekoj



da librobretoj sur kiuj montriĝas centoj da libroj en kaj pri nia kara lingvo. Kaj kompreneble troviĝas kelkaj nmodernaj komputiloj, neperfekte funkciantaj kopiilo k. faksmaŝino kaj amasoj da paperoj – bultenoj, leteroj, eseoj, reklamoj, projektoj, petoj, tradukindaĵoj, katalogoj ktp. Do rilate al tiuj aferoj ĝi tre similas nian oficejon. En angulo troviĝas kuirejo, en alia angulo malantaŭ kurteno troviĝas lito kaj apud la enirejo troviĝas privata necesejo. Tiurilate la KEACO estas pli luksa ol la nia! Tiuj lastaj (lito, necesejo, kuirejo) donas la eblecon gastigi vizitantojn ĉe la CO. Fakte mi tranoktis tie tre komforte dum du noktoj. Mi veturis kun HO Song kaj liaj edzino kaj filino al Kjungĝo, la loko de la landa kongreso. Tie mi

ĝuis du tagojn da amikiĝo kun koreaj kaj japanaj samideanoj. Cetere tiu kiu volas legi pri la KEA-kongreso kaj eĉ vidi fotojn serĉu ĉe <http://aistar.kotel.co.kr/~espero/letero/kk97.html>.

Post la kongreso mi iris kun nova amiko CHOE Taesok al lia universitata urbeto Iksan, kie li laboras plentempe kiel tradukisto kaj instruisto de Esperanto. La koncerna universitato estas centro de instruado de Ŭonbulismo, filozofia sistemo kies verkojn Taesok tradukas Esperanten. Lia oficejo estas klasika universitata oficejo: malgranda kaj malvarma, sed libroplena kaj vigla etose.

Tra lia fenestro videblas trankvila korto kie preterpasas studentoj survoje al lecionoj. Fakte la tuta kampuso estas belega kaj tre trankvila kvazaŭ monaĥejo. Taesok estas freneza komputilisto kaj posedas tre modernan komputilon. Li estas tre lerta tradukisto kiu verkas brilajn Esperantajn versiojn de la sanktaj tekstoj de Ŭonbulismo. Por pli da informoj pri Ŭonbulismo aŭ por rete konatiĝi kun S-ro CHOE, vizitu lian retpaĝon ĉe <http://soback.kornet.nm.kr/~chtaesok/indekso.html>.

Truviĝas en Seulo 3 Esperantaj oficejoj. Reveninte al Seulo, mi vizitis ankaŭ la oficejon de la Seula Esperanto-Kulturcentro, kie LEE Jung-kee private instruas Esperanton kaj vendas E-librojn diversajn. Tiu malgranda oficejo aspektas kiel librovendejo plenŝtopita de E-varoj kaj mapoj. Ĝi troviĝas en la mezo de la ĉefa kvartalo merkata en Seulo. S-ro LEE traktas sian privatan kompanion negocan de la sama oficejo kiun li plejparte dediĉas al Esperanto. Do ĉiuj negocantoj kiuj vizitas la Kulturcentron klare vidas ke Esperanto estas por li pli ol hobia!

La trian Esperanto-centron en Seulo mi ne vizitis ĉar tempo mankis. Oni diras ke tiu centro en la hejmo de la KEA-prezidinto CHONG Puramo tre belas, sed iomete foras de la urbo-centro. Do mi esperas ke mi povos viziti ĝin dum venonta vizito al Koreio.

Kiel mi jam menciis, la vera celo de mia vojaĝo estis partopreni la Kongreson de la Hokkajda Esperanto-Ligo. Dum mia dusemajna restado en Sapporo, mi gastis en la hejmo de MIYAZAWA Naoto, mia kara amiko jam dum multaj jaroj. Naoto lastatempe rekonstruis sian domon familian kaj aldonis al la nova konstruaĵo grandegan parton por Esperanta agado. Troviĝas ne nur moderna oficejo kun bona ekipaĵo, sed ankaŭ amasloĝejo, kuirejo, klasĉambro kun televidilo k. muzikaŭdigilo, kelkaj luksaj apartamentoj privataj ktp. La tuto nomiĝas "Rondetaĝo" ĉar la lokaj Esperanto-Rondoj (kaj la Hokkajda E-Ligo kaj la SAT-grupo) kunsidas tie. Sed fakte estas pli ampleksa ol nur unusola etaĝo! Oni ne povas imagi la kontraston inter la du partoj de la konstruaĵo: la patrino de Naoto planis kaj aranĝis tre klasike japanecajn loĝĉambrojn, dum Naoto aranĝis tre modernan spacon nekutiman, kiu aspektas kiel studio de skulptisto aŭ fabriko de venonta pensmaniero. En tiu Rondetaĝo mi instruis Esperanton dum la semajno antaŭ la kongreso. La studentoj bone kaj rapide progresis en tiu loko tute dediĉita al Esperanto. Mi ankaŭ helpis SUZUKI Keiko kaj SATO Eiji, la aliajn ĉefajn kunordigantojn de la koncerna kongreso, dum ili faris en la Rondetaĝo diversajn taskojn rilate al la kongreso. Mi esperas ke vi jam aŭdis pri la Esperanto-domo en Yatugatake, Japanio. Nun troviĝas alia impona centro (eĉ pli freŝa!) en Sapporo.

Dum mi vojaĝis, mi rekonis la gravecon de impona Centra Oficejo. Kiam homoj vizitas la ĉefsidejon de

ajna organizo kaj konstatas ke la oficejo estas centro de vera movado, tio impresas la vizitanton ke la projekto koncerna estas serioza afero longdaŭra. Mi fieras pri nia Centra Oficejo kaj invitas ĉiun leganton de tiu ĉi artikolo viziti la CO de ELNA aŭ la aliajn supre menciitajn en Koreio kaj Japanio. Fakte preskaŭ ien ajn oni vojaĝas troveblas vizitindaj oficejoj de la Esperanta Movado!

Miko SLOPER
Direktoro de la CO de ELNA

[La redaktoro de ĉi novaĵletero planis verki artikolon pri Esperantaj oficejoj ĉe la okcidenta flanko de la Eŭropazia kontinento (Nederlando kaj Francio) sed lia Muzo malaperis portante kun si ankaŭ lian inspiron. Espereble ŝi revenos kaj tiam vi ĝuos ankaŭ liajn opiniojn. Ĝis tiam ĝuu la ĉi-suprajn. -I.O.]

Leteru!

Marijan IVANOV, obl. Burgaska, j.k. Zlaten Rog bl. 27 st. 373, BG-8600 Jambol, Bulgario. 32-jara tekstila inĝeniero ŝatus korespondi kun usonanoj pri diversaj temoj.

WANG Qingping, Industrial & Commercial Bank, Tumen, Jinlin Province, Ĉinio. 32-jara esperantisto deziras korespondi kun usonaj geesperantistoj. Intereso: vojaĝado, muziko, ĉina kuirarto.

Bello JOHNSON, B.P. 130, Sassandra, Ebura Bordo. 27-jara instruisto ŝatus korespondi kun usonaj geesperantistoj inter 30 kaj 60-jaraj.

Carlos HERRERO MÓDENES, C/ Lurkizaga N-o 31 1 B, ES-48902 Barakaldo, Hispanio. 19-jara studento pri turismo ŝatus korespondi kun usonaj gejunuloj. Interesiĝas pri misterlibroj, fremdaj landoj kaj lingvoj.

Jesús BURGUEÑO FERNÁNDEZ, Apartado 967, ES-29080 Málaga,

Hispanio. 26-jara entreprenisto volas korespondi kun usonanoj.

Robert BIANCHI, via Fernando de Rosa 5, IT-40134 Bologna, Italio. 40-jara komencanto deziras korespondi kun usonaj geesperantistoj.

OE Hiroshi, 338 Saitama-ken, Urawa-si, Ookubo-ryouke 99-2, JP-1-201 Ekuseru, Japanio. 37-jara edzo deziras korespondi kun usonan(in)o pri diversaj temoj. Ŝatus legi, vojaĝi, korespondi, sporti. Kolektas bildkartojn.

S-ro B. K. JOSEPH, B.P. 9.511, Kinshasa 1, Demokratia Respubliko Kongo (antaŭe Zairio) deziras korespondi kun esperantistoj.

Marko PIERKIEL, ul. Krakowska 66, PL-32650 Kęty, Pollando. 37-jara fraŭlo serĉas gekorespondantojn en Usono.

Pli ol 30 murmanskanoj (12-55-jaraj) lernas Esperanton kaj pretas korespondi kun eksterlandanoj. Kontaktadreso: Aleksas MASIUKAS, pr. Lenina 101-26, RU-183013 Murmansk, Rusio.

Bogdan PAVSKIJ, YF 91/19 OTP, RU-630114 Novosibirsk, Rusio, interesiĝas pri usonaj moroj, vivmaniero kaj kulturo, kaj ŝatus korespondi kun usonaj geesperantistoj.

Anatolj GUK, ab. ya. 43, RU-347900 Taganrog, Rusio, serĉas gekorespondantojn en Usono.

Jaroslav BALKO, SK-02051 Dohňany 223, Slovakio. 34-jara edzo volas korespondi kun usonaj esperantistoj. Hobioj: turismo, ĝardenado.

Ludovit IVAN, Tyršova 6, SK-93401 Levice, Slovakio. 35-jara inĝeniero serĉas samaĝajn gekorespondantojn en Usono.

Carolyn E MANN, 818 Taylor St #D, Medford OR 97504, Usono. 47-jara bibliotekistino deziras korespondi Esperante kun neusonanoj.

Dylan ROSALEZ, PO Box 273, Sheridan WY 82801, Usono. 16-jara komencanto ŝatus korespondi pri ekskursoj kaj muziko.

IT TAKES MORE THAN ACTORS TO MAKE A PASSPORT

The picture shows some of the invaluable helpers who have worked on "Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo".

Top row: Jack Morris and Lenny Levy, the sound and lighting men; Middle row: Tom Banducci, owner of our home for 3 weeks – Bayshore Studios; Ellen Eddy, costumes and scenery; Helen Hughes, acting coach; Judy Montell, director and editor; Lusi Harmon, producer; Ashley James, cameraman and editor. Bottom row: Ionel Oneț, language editor; Natalie Sera, dialogue supervisor (also designer and assistant author of the "Intros and Outros"); Joshua Kors, assistant; and Steve Belant, logistics.



Not shown in the picture: Our author, Paul Gubbins; Bill Harmon, who prepared meals for an average of 20 people twice a day for over 3 weeks; and Alex and Lana Shlyafer. Lana became ill and had to drop out as "Helena", but she got us off to a good start and her father greatly helped us to avoid Anglicisms in the phrases and pronunciation. Orlando Raola also helped with language control; Mary Spivey designed and built the scenery; Beckie and David Harris, Rod Stanley, Charlie Galvin, Orlando Raola, and the Harmons hosted the visiting actors; Chris

Nelson and Toni Misty Johnstone gave us the "Esperanto song"; Derek Roff as head instructor for the classes at San Francisco State University made it possible for the students to take part in the filming and programmed Judy Montell's computer to enable it to write Esperanto; and Edwin Grobe gave us the FAMILIO BONVOLO!

GENEROUS DONATIONS PUT US OVER THE TOP

Thanks to the generous donations of Esperantists from around the world, we managed to collect over \$80,000 to film and edit the first four lessons. In addition to several major anonymous gifts, the

following individuals and groups gave \$500 or more (in alphabetical order): Johano & Maria Bachrich, Venezuela; Joel Brozovsky, Japan; Carson Foundation, Canada; Center for the Evolution of Democracy,

USA; Ellen M Eddy, USA; FAME Foundation, Germany; Alice Harris, USA; Dorothy Holland, USA; Saliko Foundation, Netherlands; Catherine L Schulze, USA; Robert Swenson, USA; Nobuyuki Syozi, Japan; Doris Vallon & Rollin Wheeler, USA.


VIDEO TAPES NOW READY FOR DISTRIBUTION

The first 4 videos of the 15-video series to teach Esperanto have now been completed! The introductory lesson is being written by Prof. Dun-

can Charters and the exercises are being written by Stefan MacGill. The separate text will not be ready before this summer, but the tapes can be sent to you now. If you have ordered the tapes, you should have already received your announcement. If you have not yet ordered or donated to ELNA's audacious project, your contribution would be most welcome now. We need to raise another \$100,000 before summer in order to film and edit the next 5 lessons. Contributions of any amount are welcome – but if you contribute \$500 or more, you will be listed in the credits in a future lesson if you desire.

The price of the first four lessons is still \$85; the full set of 15 is \$325. Orders and donations should be sent to ELNA (marked "for Project Pasporto"), PO Box 1129, El Cerrito CA 94530.

Lucille C HARMON



The Bonvolo Family asks for your contribution to "Esperanto, pasporto al la tuta mondo". Help them create Esperantists worldwide.

Recenze

Vivi sur barko. Eugène de Zilah. *Cannes et Clairan: Éditions Jean-Claude Bernard, 1994. 235p. 205x140. broŝurita. Ĉe ELNA: kodo: VIV005, prezoj: \$38.55/\$36.60*

Vivi sur barko. Jam ĉe la titolrigardo oni imagas homon ie en aventura veturado per mezgranda ŝipo—jen homo puŝata de la vento sed samtempe regipova kaj sendependa.

“Ĉi tiu libro ne estas romano, sed ankaŭ ne ekstrakto el miaj tagkajeroj. Malfacilas diri, kio ĝi estas. Eble letero”. Tiele enkondukas la aŭtoro al ni la libron per librokomenca Avertito. Eble ‘intelekta taglibro’ kaj ankaŭ ‘egotema letero’, kiel proponas al ni István Ertl en Antaŭparolo.


Atinginte la 51-an jaron, nia aŭtoro en 1989 decidis forlasi sian postenon en universitato. Oftas tia okazo inter homoj ĉirkaŭ tiu aĝo. Ĉi-foje la aŭtoro forte pridubas la valoron de sia laboro. Li demandas, ĉu utilas formala edukado post la elementaj jaroj. Li ankaŭ levas demandojn rilate la devon de homo obeeme sekvi ordonojn de aliaj—homo kiu mem nek petis nek konsentis esti naskita. Okazis ĉe li naŭzo rilate la vivon—naŭzo eble ne tiel forta aŭ ĝenerala kiel la priskribita de J. P. Sartre en romano tiutitola, sed sufiĉe forta por postuli al li radikalan, almenaŭ provizoran, ŝanĝon en la vivmaniero.

La libro prezentas al ni kaj la filozofiajn pensadojn de Eugène de Zilah kaj la detalojn de la vojaĝo—detales de okazintaĵoj ĉu planitaj ĉu senplane ekestintaj. Unue ni kondukiga en provan, trejnitan vojaĝon kun aliaj sur jakto *Ilouk*. Poste ni eniras la veran vojaĝadon de la geedza paro de Zilah, refoje kun laŭokazaj akompanantoj, en la propre aĉetita *Kerguelen* komence en somero de 1991. (Por la nesciantoj, ni rimarkigu ke ĉi

tiu paro Eugène kaj Madeleine estas kunredaktoroj de la Esperanta revuo *La Gazeto*, aperanta sesfoje en jaro kun pensinstigaj artikoloj kaj rakontoj celantaj plenajn regantojn de la lingvo.)

Preparante la vojaĝon, ili volas kunporti milon da libroj, laserdiskilon, sonbendaparaton. Por luksigi la vivadon, kompreneble. Sed, kiel ni diversfoje ekscias dum legado, tro ofte ne sufiĉas la luksa tempo, ĉar la irado estas plenplena je paneoj kaj preskaŭpaneoj. Fakte, ni mem fine trankviliĝas, malstreĉiĝas, kiam ni en iu loko legas, ke nia Eugène ja trovas tempon por legi kaj skribi en iu trankvila nokto.

La vojaĝo komenciĝas en suda Francio, kaj la amplekso estas de



sudorienta Hispanio ĝis suda Grekio. Izoliteco ja ne estas la konstanta kondiĉo. Sufiĉas la alteriĝoj, vizitas/helpas diversaj aliuloj; kaj kunredaktoro Madeleine eĉ dufoje foriras por prilabori *La Gazeton*, certigante ke ni abonantoj ne suferos ties mankon.

Jen aŭtoro kapabla sanskritumi. Ĉu eble sanskritumulo estas tro intelekta,

filozofa, abstrakta por ni? Ne, almenaŭ ne ĉi-foje. Jes, ĉi tiu aŭtoro kapablas filozofumi, sed evidentas ke li kapablas ankaŭ konkrete esprimiĝi. Li detale priskribas la okazaĵojn kiuj lin trafas: priskribas foje altnivele, abstrakte, alifoje eĉ skatologie, seksume. Ni sciigas pri la lertoj kaj la mallertoj de la aŭtoro, relativa noviceco pri maristaj aferoj. Kaj ni konstatas, ke li estas honestulo.

Priskriboj pri la surmara vivado prezentas teknikaĵojn apreceptajn de jam spertaj marvojaĝantoj. La priskriboj estas por ili sendube klaraj. Tuta novulo aŭ senspertulo eventuale konfuziĝas aŭ perdiĝas en la detaloj. Ni ekvidas vortojn longe enradikiĝintajn en Esperanto sed kiujn ni mem eble ne antaŭe renkontis: *babordo*, *pobo* (alinome *poŭpo*), *steveno* ktp. Sed ni povas lernadi kune kun la aŭtoro. Unue, ni trovu (pĝ. 24-25) desegnon de la ŝipo, montrantan la esencajn partojn. Helpas interalie librofina Glosaro, kaj eventuale ankaŭ *Plena Ilustrita Vortaro*, *Neologisma Vortaro* kaj aliaj leksikonoj. Troviĝas librofine ankaŭ sekcio *Fremdajoj*, por pli klarigi diversajn aferojn.

Aŭtoro/kondukisto Eugène verkas per vortprovizo jen fundamenteca/oficiala, jen neologisma—en intermikso eklektike plaĉa. Ni deflankigu momente kaj rigardu terminon *peski*. Enradikiĝis en nia ĉiutaga uzado la kunmeto *fiŝkapti*. Ĉu tio ne sufiĉas? Eble ne tute, ĉar en la Glosaro ni ekscias ke *peski* signifas “okupiĝi pri kaptado, plukado, kolektado de marvivuloj (fiŝoj, kraboj, konkoj, spongoj, algoj,...), de subakvaĵoj (perloj, rokoj,...), ilia konservado kaj pretigo ĝis enkomercigo.”

Ĉu tiu klarigo ne konvinkas nin pri la utilo de tiu *peski*? Oni ja ne faras *fiŝkaptadon* je omaroj, salikokoj ktp. Lastatempe utiligis *peski* eĉ la pretendanta ĉeffundamentisto Rikardo Ŝulco de la skolo Analiza. Sed eble

ĉe li la pravigo rilatas pli al supozata struktura nelogikeco de *fiŝkapti* ol al bezono trovi pli precizan terminon. Aliflanke, se ni petus ĉe aludisto Claude Piron, eble li trovus *kaptumi* aŭ similan kunmeton taŭga alternativo.

Denove al la koncerna libro: Marvojaĝado estas oftega temo en taglibroj, romanoj, noveloj, turismaj revuoj ktp. Sed ĉiu per si mem estas unika kaj, se lerte priverkita, interesa al eventualaj legantoj. Ĉi tiu vojaĝado de Esperantaj intelektuloj/novmaristoj estas ekzemplo de volonta, nedeviga iro for de komfortaj rutinaĵoj al novaj sin-elprovoj. Eĉ se tio en si mem ne tre maloftas, oni ne povas nei ke la afero estas unika almenaŭ pro sia esperantisteco.

Kaj krome, se vi havas intereson/amon pri fizikaj aspektoj de libroj: Jen por via frandado libro grandparte manfarita, la unua en la serio Kargo de eldonisto Jean-Claude Bernard. Ĉu libro tiuspeca ne aldonas al la teksto ion, kion oni ne kaptus per ordinara presitaĵo aŭ komputila ricevitajo?

Reg JADERSTROM (Mililani HI)

Amara vivovojo. M[ikael] Mandrik. Berkeley: Eldonejo Bero, 1997. 79p. 215x135. broŝurita. ISBN 1-882251-21-0. Ĉe ELNA: kodo: AMA001, prezoj: \$7.65/\$7.25

La proksimiĝanta al la fino nuna jarcento embarasos multajn, kiuj provos karakterizi kaj analizi ĝin. Senprecedencaj en la historio de la homaro scienc-teknikaj atingoj apud iris kaj parte servis al aventura socia eksperimentado, mond-militoj kaj amas-ekstermoj tiom grandskalaj, ke epiteto "sang-avida" firme algluiĝis al la dudeka jarcento.

La maldika aŭtobiografia libreto origine verkita en E-o apartenas al

homo preskaŭ samaĝa kiel la jarcento. Li naskiĝis en 1902 en Belorusio—tiam parto de la Rusia Imperio, do lia sorto estis travivi ĉiujn politikajn kaj sociajn kataklismojn, kiuj karakterizas la kruelan vizaĝon de la dudeka jarcento. Komencante de sia juneco kiel gimnaziano, li gvidas la leganton tra sia vivo per rakonto en simpla stilo, sed riĉa lingvo, skribante pri si kiel pri tria persono Mikaelo Markin. Kun mirinda sincereco kaj honesteco la aŭtoro prezentas sinsekvajn epizodojn de sia vere amara vivovojo. Li estis nur unu el pluraj dekmilonoj en Orienta Eŭropo, kies vivon kripligis aŭ nenigis militaj kaj politikaj plagoj. Kvankam por legantoj en pli-malpli bonfartaj landoj multaj epizodoj el la vivo de la aŭtoro ŝajnos teruraj, envere li estis eĉ iom bonŝanca ĉar en sia vivo, kvankam amara, li iel evitis plej ekstremajn teruraĵojn de la Sovetia kaj Nazia reĝimoj.

Komprenante ĉi tiun grandskalan tragedion de ĉiuj popoloj en Eŭropo, la esperantista legantaro aparte interesiĝas pri la sorto de esperantistoj. Tiuj noblaj idealistoj, disĉiploj de la Interna Ideo devis percepti precipe dolore la sencecon kaj brutalecon de mond-militoj, amas-ekstermoj kaj malmorala politiko. Ni devas vere admiri kiel la aŭtoro dum sia malsata, malvarma kaj malkomforta juneco tiel facile entuziasmiĝis pri E-o, el-lernis ĝin kaj sukcesis porti tra sia tuta vivo en medio, kiu nur ekstreme favoris al E-o.

Ni analizas kaj serĉas motivojn, kiuj povus instigi nuntempajn homojn apliki E-on, konsiderante turismon, internacian korespondadon kaj komunikadon kiel naturajn logaĵojn. Do estas vere instrue por ni enpensiĝi ankoraŭfoje, kiel la esperantistoj de tiu tempo kaj en tiu mondoparto aktivis malgraŭ ke ili ne povis ĝui la menciitajn avantaĝojn kaj eĉ riskis sian pozicion en la suspekt-

ema agresiva medio; kiel ili kapablis ne forgesi la lingvon en teruraj kondiĉoj de kaptiteco aŭ multjara izoliteco. Jen kiuj estas modestaj herooj de nia sufer-abunda E-a historio.

Se paroli pri la teknika flanko de la eldonajo, mistajpoj aŭ malglataĵoj tie estas, kvankam ne multaj. Unu okulfrapa enŝteliĝis en la moton mem (en la vorto "finiĝis" mankas unu i). En la sama linio ankaŭ necesus traduki (aŭ menci i en piednoto) la esprimon "Grand Guignol" ("granda pupo" en la franca). En la "Vortoj de la eldonisto" la frazo "M. Mandrik ne volis vidi la finon de la jarcento antaŭ la publikiĝo de la jenaj paĝoj" ŝajnas apenaŭ komprenebla. En pli glata lingvo ĝi devus aspekti jene: "M. Mandrik deziris ke publikiĝo de jenaj paĝoj okazu almenaŭ antaŭ la fino de la jarcento". Ankoraŭ estas kelkaj stilaj rimarkoj. Sur paĝo 8 la vorto "avertis" devus preferi anstataŭi la vorton "antaŭsciigi". Sur paĝo 20 la vorto "esklamis" verŝajne estas erara formo de "eksklamis", sed laŭ mi la fundamenta "ekkriis" estas pli bona. Sur paĝo 34 estas mistajpo en la vorto "observis" (mankas s). La sama manko sur paĝo 37 en la vorto "aŭskultu", dum sur paĝo 59 ĉi-insida litero malnecesas aperas en la vorto "diris" kie envere devas esti infinitivo. Sur paĝo 60 en la esprimo "la letero estis malofta" efektive necesas epiteto "neordinara".

Cetere ĉi tiuj malmultaj mankoj ne malgrandigas la valoron kaj utilon de ĉi-libro, kiu lasas la leganton kun la sola bedaŭro, ke la rakonto finiĝas tiel frue: en 1966. Kiom multe ankoraŭ povus rakonti kaj pridiskuti la multesperta emeritulo! Eble li kur-aĝos, spite al sia rimarkinda aĝo, verki daŭrigitan version de sia eminenta vivovojo.

Aleksandro GOFEN (San Francisco)

Alvoko al literaturemuloj

Ĉi-jare nia lingvo fariĝos 111-jara. 111—kia bela aĝo por bela lingvo! Tiu bela lingvo, daŭre persekutata, primokata, neglektata, hatata, malpermesata, ktpata, donis al siaj parolantoj la eblecon ĝui beletron—originalan kaj tradukitan—, kiu, se estus havebla en la tiel nomataj “grandaj” lingvoj, portus la atributon monda literaturo”. Kompreneble aperis nialingve ankaŭ fuŝaĵoj, samkiel en aliaj lingvoj. Ankaŭ ili havas valoron, eĉ se nur edukon: tiaĵoj oni ne plu eldonu!

Por tiuj kiuj tamen ŝatas valoran (jen relativa termino) literaturon ni lanĉas la alvokon sendi al ni kontribuojn por *Literatura suplemento de Esperanto USA*, kiun ni planas aperigi en la 111-a jaro de nia erao,

t.e. la Esperanta erao. Sendu viajn originalajn verkojn (tamen, ne romanojn) en Esperanto, viajn tradukaĵojn en Esperanton, viajn tradukaĵojn el la originala Esperanta literaturo en la anglan. Traserĉu viajn (mal)ordajn tirkestojn, viajn polvkovritajn sliparojn, viajn neinfektitajn disketojn kaj surprizu nin. Niaflanke ni faros nian plejebilon por surprizi niajn legantojn, kiuj jam kelkajn jarojn atendas la antaŭlonge promesitan *Literaturan suplementon*.

Se temas pri kopirajtitaj materialoj ne forgesu akiri la rajton aperigi la koncernan verkon en nia *Suplemento*. Kaze de plagiatoj, kiujn ni ne aparte bonvenigas, la respondecon portos la sendintoj. Se hazarde—dubinda afero tamen—vi planas

sendi al ni fuŝaĵojn, ni sugestas ke vi rezignu momente, ĝis kiam ni petos kontribuojn por *Suplemento de literaturaj fuŝaĵoj*. Verkojn jam publikigitajn bonvolu ne sendi al ni; ili bonvenos en *Suplemento de Esperantaj reeldonaĵoj*, kaj tion ni ne celas ĉi-jare.

Sendu do (antaŭ la 30a de junio) novajn, freŝajn kontribuojn, kiuj montru ke en la Nova Mondo oni kreas novan literaturon en nova lingvo. Viajn kontribuojn sendu helikpoŝte, fakse aŭ e-poŝte al la C.O. de ELNA, kun la mencio “Literatura suplemento”. Senditajn kontribuojn oni resendos nur laŭpete kaj se oni antaŭpagos la sendokostojn.

Regiono kaj loko

Esperanto-Rondeto de Santa Barbara gastigos la Tut-Kalifornian Esperanto-Konferencon ĉe Sandman Inn inter la 3a kaj la 5a de aprilo ĉi-jara. La temo de la konferenco estos “Esperanto kaj paco”. Por pliaj informoj kaj por aliĝoj, oni sinturnu al: Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara CA 93111; ☎ 805/967-5241.

La formiĝanta Esperanto-Klubo de Kansas City, c/o Timothy Wand, 2422 Hardesty Av, Kansas City MO 64127, bonvenigas konsilojn de aliaj lokaj E-grupoj.

22 members of the Seattle Esperanto Society met Jan 3, 1998 at the Washington State History Museum in Tacoma and put on an introduction to Esperanto in song for museum visitors. Led by Leland Ross and Tatiana Weyrick, the audience joined in Esperanto versions of some popular songs. (reported by Leland Ross)

Menciinde...

ELNA-membroj, kiuj estas ankaŭ membroj de U3A (Universitato de la tria aĝo) estas petataj kontakti: Hy MELTZ, 3988 Sabal Dr, Oviedo FL 32765; ☎ 407/365-6387; e-poŝto: h18067@aol.com.

Jurij KORSUN, ab. ya. 7, UA-24511 Shostka-7, Ukrainio, viktimo de la Ĉernobila atomkatastrofo, serĉas adresojn de organizoj, kiuj prizorgas viktimojn de la katastrofo, por siaj infanoj, kiuj suferas pro la menciita akcidento.

Kondolencojn al Ellen M Eddy (Tumwater WA) pro la forpaso de ŝia patrino fine de la pasinta jaro.

Adiaŭon al Adrian Hughes (Hillsboro OR) forpasinta antaŭ nelonge.

Adiaŭon al Earl Galvin (San Francisco CA) forpasinta ĉi-januaire.

“The gods would confer great benefit on humanity if they would grant it a common language.” (Plato)

Komisiitoj kaj komitatestroj

Arĥivo – Ionel Oneț; Aŭdvida instruado – Lucille C Harmon; Edukado – R Kent Jones; Eduka fonduso Schulze – Ellen M Eddy; Ekzamenoj – Dorothy B Holland; Eldona komitato – Miko Sloper; Fonduso SFŜU – Catherine L Schulze; Fonduso Thomson – Lucille C Harmon; Junularaj aferoj – Joseph Truong; Kapital-fondusa komitatestro – William R Harmon; Korespondaj kursoj – Dorothy B Holland; Leĝaj aferoj – John Dale Jr; Lokaj grupoj – David Wolff; Nomuma komitato – David K Jordan; Reklamado – Grant Goodall; Senpaga perpoŝta kurso – Catherine C Schulze; UEA – William R Harmon; UN-aferoj – Julius J Manson; Vojaĝaferoj – Lucille C Harmon. Por kontaktablecoj, bonvolu konsulti la Membroliston de ELNA aŭ kontakti la COn de ELNA.

English...

(thanx to Timothy J Tikker, Sabine Darbellay and William R Harmon for their contributions)

... in the United Kingdom

Automatic washing machines: please remove all your clothes when the light goes out. (In a laundromat)

Bargain basement upstairs. (In a London department store)

Would the person who took the step ladder yesterday please bring it back or further steps will be taken. (In an office)

Horse manure: 50p per pre-packed bag; 20p per do-it-yourself. (Outside a farm)

After tea break staff should empty the teapot and stand upside down on the draining board. (In an office)

This is the Gate of Heaven. Enter ye all by this door. [This door is kept locked because of the draft. Please use side door.] (On a church door)

We exchange anything – bicycles, washing machines, etc. Why not bring your wife along and get a wonderful bargain? (Outside a second-hand shop)

The Town Hall is closed until opening. It will remain closed after being opened. Open tomorrow. (Sign outside a new town hall which was to be opened by the Prince of Wales)

Out to lunch; if not back by five, out for dinner also. (Outside a photographer's studio)

Slow cattle crossing. No overtaking for the next 100 yrs. (Seen at the side of a Sussex road)

Smarts is the most exclusive disco in town. Everyone welcome! (Outside a disco)

Quicksand. Any person passing this point will be drowned. By order of the District Council. (Warning sign by a trailside)

Due to increasing problems with letter louts and vandals we must ask anyone with relatives buried in the

graveyard to do their best to keep them in order. (Notice sent to residents of a Wiltshire parish)

Anyone leaving their garments here for more than 30 days will be disposed of. (In a dry cleaner's window)

Please do not smoke near our petrol pumps. Your life may not be worth much but our petrol is. (On a motorway garage)

Closed due to illness. (Sign in a health food shop window)

Elephants please stay in your car. (Spotted in a safari park)

For anyone who has children and doesn't know it, there is a day care on the first floor. (Seen during a conference)

The farmer allows walkers to cross the field for free, but the bull charges. Running across this field takes a man 12 seconds, bull does it in 10. (Notice in a field)

If you cannot read, this leaflet will tell you how to get lessons. (Message on a leaflet)

Beware! I shoot every tenth trespasser and the ninth one has just left. (On a Norfolk farm gate)

We can repair anything. [Please knock hard on the door – the bell doesn't work.] (On a repair shop door)

Toilet out of order. Please use floor below. (In a toilet in a London office building)

Mothers, please wash your hands before eating! (In a cafe)

... in the People's Republic of Berkeley

Fashion for less offers for sale "Men's Jean's" and "Name Brand Shoe's", but attention, "No food or drink's inside".

... in the People's Republic of China

Let's protect onp earto. (Sign on trash cans in a Beijing coffee shop)

How do you spell BEAUTY CENTER in Beijing? Here is the solution:



... in Nippon

Matsushita Electric is promoting a new Japanese PC targeted at the Internet. Panasonic has developed a complete Japanese Web browser, and to make the system "user-friendly", licensed the cartoon character "Woody Woodpecker" as the "Internet guide." Panasonic eventually planned on a world version of the product. A huge marketing campaign was to have introduced the product in Japan last week. The day before the ads were to be released, Panasonic suddenly pulled back and delayed the product launch indefinitely. The reason: the ads featured the slogan "Touch Woody – the Internet Pecker." An American staff member at the internal product launch explained to the stunned and embarrassed Japanese what "woody" and "pecker" meant in American slang.

Esperanto in the media

Esperanto Internet Services (EIS), <www.esperanto.com> an organization that provides multilingual HTML programming, "... was founded ... in the spirit of the Esperanto language, to ease communication between individuals of diverse nations and cultures."

"I left [Hungary] in 1947. I got my passport, and then went to Switzerland to attend an Esperanto conference, because my father was en

Esperantist. At that time, you also needed a Soviet exit permit, and I didn't have one. It was a group permit for the Esperanto conference and I missed the group because I didn't get my passport in time, so I had to go after them." (*Soros on Soros. Staying Ahead of the Curve*. John Wiley & Sons, Inc. 1995) And what is the multi-millionaire doing now for the language that helped him escape from his native Hungary?

Puerta del Sol, a bi-monthly bilingual magazine published in Nashville TN, dedicated a good portion of its Nr. 3/1997 to Esperanto.

According to *World Language Resources* (Vol 5, 1997), the following computer applications can handle Esperanto characters: OmniPen™, WordMate™, The Universal Word, and Recognita OCR.

The State History Museum in Tacoma WA is presenting an exhibition entitled "Living the Perfect Life: Utopias and Communes in Washington State", from Oct 1997 to Jan 1998. It is planned to inform visitors about the early Esperanto movement there, a focal point being the "Home Commune", which existed between 1885 and 1905. (*La Brita Esperantisto* Nov-Dec 1997)

"All natural human languages exist and change regardless of human intervention; only an artificial language such as Esperanto can be described as a 'product of careful engineering.' All languages, from that spoken by citizens of a powerful empire to that spoken by a small fishing community on a remote island, are equally complex." (Jennifer Muller, Dublin OH in *National Geographic* Dec 1997)

In a lengthy article about the "clash of languages" *The Christian Science Monitor* (Dec 10, 1997) mentions that "More than 100 years ago, an attempt was made to break down world communications barriers by

inventing the culture-bridging, nationality-neutral language Esperanto."

CNN mentioned Esperanto in a broadcast about language problems in the EU, on Dec 15, 1997.

The Christian Science Monitor published on Dec 18, 1997 a letter in praise of Esperanto by ELNA member Lee A Miller (Columbia MO).

On the TV comedy series *Frazier* (Dec 30, 1997), a Hispanic singing star asks Frazier's female friend whether she speaks Spanish. She responds "not really". The singer comes back with a sexy "That's alright. I'm sure you speak the international language," implying lovemaking. Frazier sarcastically quips "Go ahead, say a few words to him in Esperanto."

In *The Yanni Files* by Kurt Andersen published in *The New York Times* (Jan 17, 1998), the author recognizes that "Sure, we made mistakes. That first season of performances in Esperanto was an idea whose time had not yet come." Whose fault is that?

A lengthy article titled *Esperanto becoming a worldwide phenomenon* appeared in *Valley Morning Star*, Harlingen TX, on Jan 22, 1998. A large picture of Prenda Cook's Esperanto class accompanies the article.

Esperanto got an unwelcome mention in *Bay Area Reporter* (22 Jan 1998) in an obituary for ELNA member Earl Galvin (San Francisco CA), who passed away in January.

Esperanto gets a very positive mention on the videotape *Democracy in Time*, just released by Center for the Evolution of Democracy (Martinez CA).

The LA-based group Helix will use Esperanto on their soon-to-be-released album *Grow Wild*. Details to follow.

Call for Slogans

The Publicity Committee is now engaged in creating a detailed plan to raise public awareness about Esperanto. One aspect of the plan will likely be a magazine-based advertising campaign. An advertisement needs a sharp slogan to attract attention and quickly fascinate the reader. Think of Coca-Cola's famous phrase "It's the real thing" or MacDonalds' "You deserve a break today".

David Wolff has created a series of posters which point out various aspects of our dear language. The slogan most used in this series is "The international language that works". This is an excellent slogan: we used it for our bumperstickers! (BTW I hope that you all actually put your copy of the bumpersticker on your car; they do but little good hidden in a desk drawer, while they are surprisingly effective out in public view.) But a new campaign should have a new vital slogan, don't you think?

I am therefore asking for your suggestions for a hot new irresistible slogan for the soon-to-be-launched publicity campaign. I have already coined a few potential candidates. I welcome your comments on these in addition to slogans of your own.

Given that UEA's Kampanjo 2000 aims to focus on the great calendar change, I have thought a similar emphasis could yield "Esperanto: a new language for a new millenium". Or leaning on the fact that our language is among the youngest, and should therefore appeal to youth, I suggest "Esperanto: it's fresh!". Or for those who have already encountered problems learning other languages, I propose "Frustrated with French? Russian too rough? Esperanto is EASY!"

Please send your proposals and comments directly to me at the Central Office.

Miko SLOPER

Vojaĝu kun ni en Esperantio '98

TKEK - April 3-5, 1998. La Tut-Kalifornia Esperanto Konferenco will be held in beautiful Santa Barbara at the Sandman Inn. Contact: Hope Smith, [805] 967-5241 or e-mail to hsmith1923@aol.com.

NOREK - May 29-31, 1998. La Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco okazos en Olympia, WA. Temo: "Internacia Jaro de la Oceano". Ellen M. Eddy, Box 4055, Tumwater WA 98501 aŭ eddyellen@aol.com.

San Francisco State University Classes - 29th year! 5-24 July; 3-week intensive multilevel courses. Instructors: Prof. John Wells (England), Katalin Smidéliusz (Hungary), Aleksandr Shlyafer (Russia/USA), Kanae Hirose (Japan). **The best in the world!** Contact Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010; telephone [650] 342-1796.

Annual Convention of E.L.N.A. 24-27 July, 1998 - Montreal, Canada Montreal is a vibrant, modern city and well worth the visit in itself. Detaloj baldaŭ haveblaj de ELNA.

Nun ke ni refoje ĝuas regulan aperadon de Esperanto USA, anoncu viajn kunsidojn al Esperanto Vojaĝ-Servo, por ke ni povu inkludi ilin en estontajn listojn de eventoj.

Antaŭkongresa Vizito

Riviera kaj Provence

27 julio - 1 aŭgusto.

From Menton to Toulon, the Riviera including Nice and Monaco are justly famous for their spectacular scenery and mild climate. We start here before proceeding to Provence, which combines historic sites with the best food in France. Lilacs and perfumes; spices, food and wine; the special light and atmosphere that gave the impressionists their inspiration, and the lovely warm countryside of Southern France. Grasse, Aix-en-Provence, Avignon, Cezanne, Van Gogh, Gauguin! What a joy!

83a Universala Kongreso

Montpellier, Francio



"The Mediterranean:

Bridge Between Cultures"

Exploration of this theme at the UK will enable a better understanding of the culture of this region of the world, and will simultaneously explore the role of our own intercultural bridge, Esperanto.

Montpellier is one of the lesser-known jewels of France. And very French it is, from the battlements of the ancient city to the walls of the newer Greek-appearing Antigone. The new addition, known locally as the "Anti-Gone" was constructed as a reaction against the ultramodern gigantic indoor shopping mall known as the "Polygone." Oh, so very French!

Postkongresa Ekskurso:

Ekzotika Francio - 9-16 aŭgusto

From Montpellier through Narbonne to Carcassone, the double-walled fortress town which offers insights into 15 centuries of turmoil. On through Albi, the birthplace of Toulouse Lautrec and the hilltop town of Cordes into the Dordogne River Valley, lined with medieval castles and chateaux; also the caves where Cro-magnon man lived. We visit elegant Bordeaux. This lively cosmopolitan city features the best wine in the country and some of the best examples of 18th century architecture in the nation.

We end in Paris after going through Tours and the chateau region. France is delightful country to visit, and traveling with Esperantists from around the world adds a special je-ne-sais-quoi to the trip.

Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 La Salle Avenue
Oakland CA 94611
[510] 339-2001
Fax [510] 531-0152
LusiHarmon@AOL.com

Esperanto League for North America
P.O. Box 1129
El Cerrito CA 94530

BULK MAIL
U.S. POSTAGE
PAID
PERMIT #1040
LEESBURG, FL
34748